

## La lingvoj de Zamenhof (1878, 1881, 1887, 1905)

Christer Kiselman

### Enkonduko

La Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds organizis kolokvon nomatan *Vivanta lingvo de vivanta komunumo* en februaro–marto de 2015. La prezidanto de KCE, Giorgio Silfer, invitis min tie partopreni, pro kio mi estas tre danka. En la nuna teksto aperas proksimume kvinono de mia tiea prezento, *La lingvoj de Zamenhof (1878–2015) – rapida travigardo de rapida lingvoevoluo*; tial mi mencias kelkajn temojn tre mallonge, aliajn tute ne.

### *Lingwe uniwersala: Bjalistoko 1878*

Malmulton ni konas pri Lingwe uniwersala, la unua antaŭiranto de esperanto. Tamen kelkaj trajtoj estas klare videblaj – vidu Waringhien (1989:22, 38–40) kaj mian artikolon (2011:84–87). Ĉi tie ni nur notu ke, tute kiel nia nuna lingvo, ĝi estas aglutina, kaj la ideo marki vortklasojn per specifaj finaĵoj estas jam enkondukita: du gravaj trajtoj kiujn Zamenhof neniam forlasos. Malsame ol esperanto la atestita vortprovizo estas nur latindevena; la akuzativo ne estas markita; la artikolo estas *la* en singularo kaj *las* en pluralo.

En la kantado en la hejmo de Zamenhof en Bjalistoko partoprenis laŭ Golden (1978) Leo Wiener (1862–1939), kiu en 1907 tre forte kritikis esperanton (2015).

### *Lingvo universala: Moskvo 1881*

Lingvo universala estas alia etapo en la evoluigo de la lingvo fare de Zamenhof. Pri ĝi ni konas multe pli ol pri Lingwe uniwersala: ni havas bonan superrigardon de la gramatiko kaj almenaŭ parton de la kerna vortprovizo. Pri ĝi bonvolu vidi Waringhien (1989:22–37, 41–48), Cash (1992) kaj mian artikolon (2011:87–102).

Zamenhof studis medicinon en Moskvo dum du jaroj: de aŭgusto 1879 ĝis aŭgusto 1881 (Nekrasov 1987), kaj dum tiu tempo li plej verŝajne laboris pri sia lingvo.

Lingvo universala havis du verbajn formojn por indiki pasintecon: preteriton kaj imperfekton.

La finaĵo por preterito estis *-u*: *allu* ‘iris’, *ĉidu* ‘decidis’, *ektisku* ‘ekplaŭdis’, *habu* ‘havis’, *kinu* ‘ricevis’, *pallu* ‘diris’, *vidu* ‘vidis’.

La finaĵo por imperfekto estis *-á, -à*: *brulá, brulà* ‘bruladis’, *está* ‘estadis’, *forallá* ‘foriradis’, *pallá* ‘paroladis’.

Notinde estas ke Waringhien en sia traduko el Lingvo universala (1989) ĉiam redon(ad)is imperfekton per *-adis*: *habá* ‘havadis’, *debá kini* ‘devadis ricevi’. Eble

la uzo de *ad* estas tro forta emfazo de la daŭro: simpla verboformo pli diskrete ol sufikso indikas daŭron.

Waringhien tradukas *pallu* per ‘parolis’ sed mi opinias ke la signifo ‘diris’ estas pli bona. Kontraste, *pallá* povas esti donita per la simpla ‘parolis’ anstataŭ per la pli longaj ‘paroladis, estis parolanta’. En la nuna esperanto, kie la aspektoj ne estas same videblaj kiel en Lingvo universala, ili povas, en tiu ĉi okazo, esti donitaj per du malsamaj verboj: *pallu* ‘diris’, *pallá* ‘parolis’. Evidente tio ne povas esti ĝenerala solvo.

La nuna *-is* servas kaj por *-u*, kaj por *-á*.

La aliaj verbaj finaĵoj ne estis identaj kun la nunaj, sed tamen samfunkciantaj: *-é*, *-è* por la nuna *-as*; *-uj* por *-os*; *-ó* por *-u*; *-as* por *-us*. Simile por la participoj, el kiuj ni havas ateston pri kvar: *-enta* por la nuna *-anta*; *-aga* por *-inta*; *-ita* por *-ata*; *-assa* kaj *-ata* por *-ita*; ekzistis respondaj konverboj kun fina *-e*.

Evidente temas pri aspektoj. La imperfekto estas ĉiam uzata kiam temas pri priskribo de fona situacio (kiel en multaj lingvoj kun aspekta verbosistemo), dum la preterito estas uzata por raportoj pri okazintaĵoj antaŭ la fono skizita aŭ skizata per imperfekto, aŭ dum situacio rakontata per imperfekto.

En malnovaj desegnitaj filmoj la fono (senmova) estas desegnita per malpli brilaj koloroj ol tiuj uzataj por la agantoj (moviĝantaj). Ĝuste tiel estas pri la imperfekto kaj la preterito.

La du tensoj en Lingvo universala kiuj implicas daŭron, do prezenco kaj imperfekto, estas markitaj per akcento sur la lasta vokalo, imagigante daŭron. Simile la imperativo kun *ó* estas tre konvinka: *alló!* ‘iru!’, *ottó!* ‘aŭskultu!’, *fajfó!* ‘fajfu!’, *tajmó!* ‘restu!’. Ĝi estas la sama kiel en Lingvo uniuersala, *Kadó*, *kadó*. Krome *ó* estis uzata pure volitive en celaj propozicioj: *dam fiu fol potó vidi* ‘por ke neniu tion povu vidi’.

Lingvo universala estis en multaj rilatoj tre simila al Lingvo internacia de 1887, sed enhavis kelkajn diferencojn, precipe pri la verbaj finaĵoj jam menciitaj kaj la tabelvortoj. La adverboj ofte estis tre mallongaj.

La vortprovizo de Lingvo universala estis plejparte latiniddevena, kun plej multaj vortoj el latino kaj multaj vortoj francdevenaj kaj krome kelkaj italdevenaj. Sed konsiderinda malplimulto en la atestita vortprovizo estas ĝermandevena (germandevena, jiddevena kaj en malmultaj okazoj angledevena). Krome, alia malplimulto estas slavdevena (rusdevena kaj poldevena). Ekzistas pli da hebredevenaj vortoj ol en Lingvo internacia de 1887, kalkulante la nombrojn, kaj kompreneble eĉ pli kalkulante la procentaĵojn. Fine kelkaj vortoj estas grekdevenaj.

## ***Lingvo internacia: Varsovio 1887***

Kiel ni ĉiuj scias Zamenhof, 27-jara, publikigis sian lingvon en 1887 en Varsovio. Du datoj gravas: 1887-05-21 kaj 1887-07-14 laŭ la julia kalendaro, respondaj al 1887-06-02 kaj 1887-07-26 laŭ la gregoria. La unua estas la dato de permeso fare de la cenzuro — post tiu permeso oni ne rajtis ŝanĝi la enhavon. Ekde la dua dato Zamenhof rajtis distribui sian libron (Adam 1979:10; Kiselman 2015:76).

Sed Zamenhof klopodis pri pli frua publikigo:

Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigadis mian broŝuron por eldono kaj fine — rifuzis. (Letero 1895 al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko; Zamenhof 1948:350)

La pluskvamperfekto en la lingvo de Zamenhof restis ankoraŭ en 1881. La imperfekto, kies finaĵo estis *-á* en 1881 kaj *-es* pli malfrue, restis ĝis la komenco de 1887, do mallonge antaŭ 1887-06-02. (Artikolo pri la deveno de Esperanto, Zamenhof 1948:351.)

Tio signifas ke la imperfekto restis dum li klopodis pri publikigo ĉe iu alia eldonanto ol Kelter. Kaj ke, se li estus sukcesinta, la imperfekto — kaj kun ĝi la aspektoj esprimitaj per *-is* kaj *-es* — nun plej verŝajne estus parto de nia lingvo.

## Aspektismo kaj tempismo

Mi menciis mallonge la *ata/ita*-konflikton, alivorte inter la tempisma kaj la aspektisma skoloj. Gravaj tekstoj por la aspektisma flanko estas de Hoog k.a. (1961) kaj Kalocsay (1966). Por la tempismo argumentis Setälä k.a. (1965), Vilborg (1973), Ŝulco (“erara aspektisma doktrino”; 1987:172).

Ne eblas ĉi tie detale pritrakti tiun ĉi lingvan problemon. Sed mi volas klarigi ideon pri ĝia apero. Ni vidis ke Lingvo universala havis preteriton (*pallu* ‘diris’, *allu* ‘iris’) kaj imperfekton (*pallá* ‘paroladis’, *forallá* ‘foriradis’).

Ni scias ke la imperfekto restis en Lingvo internacia ĝis komence de 1887 (*paroles* ‘paroladis’).

Tre mallongan tempon antaŭ la permeso de la cenzuro 1887-06-02 Zamenhof forprenis la finaĵon *-es* por la imperfekto, kaj restis por esprimi pasintecon per simpla verboformo nur la finaĵo *-is*.

Do, dum la tuta tempo de la evoluigo de la lingvo, almenaŭ de 1881 ĝis komence de 1887, la lingvo havis kompletan ilaron por esprimi aspektojn en pasinteco: du simplajn verbajn formojn, participojn kaj konverbojn. La malapero de unu sola elemento el tiu ilaro ne povis ĉion ŝanĝi. Restis aspektismaj konsideroj ĉe la participoj kaj konverboj — ili ekzistas en la orienta jido, la rusa kaj la pola. Do ne mirige la aspektistoj povis apogi sin per multe da materialo.

Sed la tempistoj ja povas apogi sin per la fakto ke la publikigita Unua libro de 1887 (1887a, 1887b, 1887c, 1887d), same kiel la leĝdonanta Fundamento (1905), ne enhavas imperfekton.

Mi do komprenas la konflikton tiel: la aspektistoj vidas en la lingvaĵo aspektojn, kiuj ja travivis la forigon de unu sola finaĵo; la tempistoj vidas la leĝon, la Fundamenton, kiu ne enhavas imperfekton. Ambaŭ skoloj havas argumentojn.

Kio plej gravas: la per aspektoj dum jaroj trempita lingvaĵo aŭ la leĝo?

## Referencoj

- Adam, Z. (Pseŭdonimo de Adam Zakrzewski, 1856–1921). 1979. *Historio de Esperanto 1887–1912*. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio. (Represo de la originalo el 1913; Varsovio: Librejo Gebethner kaj Wolff.)
- Cash, Rikardo. 1992. *Praesperanto. Lingvo universala*. La Kancerklinikoteko. ISSN 0398-5822.
- Д<sup>р</sup> Эсперанто [Dr<sup>o</sup> Èsperanto; pseŭdonimo de Д<sup>р</sup> Л. Заменгофъ]. 1887a. *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ*. Varsovio: Типо-Литографія Х. Кельтера. 42 pp + faldfolio.
- Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de Dr. L. Zamenhof]. 1887b. *Język międzynarodowy. Przedmowa i podręcznik kompletny*. Varsovio: Druk. i Lit. Ch. Keltera.
- Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de Docteur L. Samenhof]. 1887c. *Langue internationale. Préface et Manuel complet*. Varsovio: Imprimerie de Ch. Kelter. 48 pp + faldfolio.
- Dr. Esperanto [Pseŭdonimo de D<sup>r</sup> L. Samenhof]. 1887d. *Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch*. Varsovio: Druck von Ch. Kelter.
- Golden, Bernard. 1978. La 100-jara datreveno de Lingve Uniwersala. *Heroldo de Esperanto*, N-ro 17 (1641), 1978-12-16, pp. 1, 3.
- de Hoog, H. A.; Gregor, D. B.; Kalocsay, K.; La Colla, S.; Lapenna, I.; Nakamura, T.; Pumpr, T.; Régulo, J.; Schwartz, R.; Sonnenfeld, E.; Waringhien, G. 1961. *La Zamenhofa Esperanto. Simpozio pri -ata/-ita*. La Laguna: J. Régulo.
- Kalocsay, K. 1966. *Vojaĝo inter la tempoj. Gramatika studo*. La Laguna: J. Régulo.
- Kiselman, Christer. 2011. Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies* 5, 79–149.
- Kiselman, Christer. 2015. Kombineblo de vortelementoj en esperanto – rigardoj malantaŭen kaj antaŭen. *Esperantologio / Esperanto Studies* 7, 73–125.
- N[ekraso]v, N[ikolaj] V[ladimirovič]. 1987. Zamenhof en Moskvo. Nepublikitaj dokumentoj el la jaroj 1879–1881. **En:** *iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof. kromkajero 3. ludovikologiaj biografietoj*, pp. 52–62. Tokio: ludovikito. (Noveldono de artikolo el *la nova epoko* 1929, pp. 58–68.)
- Setälä, Vilho; Vilborg, Ebbe; Støp-Bowitz, C[arl]. 1965. *Esperanto — moderna lingvo*. Helsinko: Fondumo Esperanto.
- Ŝulco, Rikardo. 1987. *Sur la vojoj de la Analiza Skolo. Esperantologia esearo*. Eldonita de Hermano Bermano. Paderborn: Esperanto-Centro.
- Vilborg, Ebbe. 1973. *La partecipa problemo en La Akademio. Dokumentaro kompilita kaj komentita*. Goteburgo: Lingva Komisiono.
- Waringhien, Gaston. 1989. *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj*. Dua eldono kun apendico. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. (Unua eldono 1959, La Laguna: J. Régulo.)
- Wiener, Leo. 2015. *Universalsprachen und Esperanto. Zwei vergessene Beiträge zur Interlinguistik*. Bad Bellingen: Edition Iltis. (Noveldono de du tekstoj el 1907.)
- Zamenhof, L. L. 1905. *Fundamento de Esperanto*. (Pluraj postaj eldonoj.)
- Zamenhof, L.-L. 1948. *Leteroj de L.-L. Zamenhof*. Prezento k[aj] komento de Prof. G. Waringhien. I, 1901–1906. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

*Paperpoŝta adreso de la aŭtoro:* Upsala universitato, Instituto pri informadiko,  
Poŝtkesto 337, SE-751 05 Uppsala

*Sukcenaĵ adreso:* kiselman@it.uu.se, christer@kiselman.eu

*Retejo:* www.cb.uu.se/~kiselman